

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Historio

Barono Franz von Trenck - Komandanto de Panduroj

Zdeněk Závodný

La urbo Brno (Brunno) estas ligita kun vico da personuloj, kiuj per siaj agoj sin profunde enskribis en ĝia historio kaj ankaŭ vaste enradikiĝis en la konscienco de popolo pro sia ekskluziveco aŭ mistero. En la epoko de la aŭstria imperiestrino Maria Theresia tia personulo certe estis ankaŭ Barono Franz von Trenck, timinda kaj samtempe admirata komandanto de la famaj Panduroj (latine BENDERIUM).

Sur muroj de ŝtuparo en la kriptono de fratoj kapucenoj, kie je eterne dormas Barono Franz von Trenck, latinaj surskriboj "MEMENTO MORI" kaj "TU FUI EGO ERIS" nin admonas, ke ankaŭ ni mortos.

Kolonelo de la aŭstria imperiestra kaj reĝa armeo Barono Franz von Trenck naskiĝis la 1-an de januaro 1711 en la urbo Reggio de Calabria (en la orienta parto de la estinta kroata reĝlando, hodiaŭ teritorio de Italujo). Bonan edukon li ricevis en la historia Hungarlando en jezuitaj lernejoj en Sopron kaj Pozsony (hodiaŭ Bratislava). Militistan akademion li frekventis en Vieno, kie en la aĝo de 17 jaroj li ricevis oficiran rangon kaj enviciĝis en la 8-an Pálffy infanteri-regimenton. Sed, pro sia ekscentra konduto kaj maldisciplino, li devis, en la jaro 1731, rezigni pri militista servo, tamen ne por longa tempo.



En la jaro 1737 eksplodis milito kun Turkio, barono Trenck, kiel homo de la ago, ne hezitis longe kaj jam en la sekvanta jaro starigis armitan grupon de 300 rajdistoj, kun kiuj li transiris en Rusion, kie li asociiĝis al rusaj regimentoj batalantaj kontraŭ Turkioj, sub la supera komandanto de B. Ch. A. Munnich. Li aĝis 27 jarojn kaj sopiris pri la granda militista gloro, do li petis permeson plinombrigi sian kavalerian eskadronon al nombro de mil rajdantoj, sed tiun permeson li ne ricevis.

Per sia sovaĝa kuraĝo kaj dura sinteno Trenck gajnis respekton kaj favoron de marŝalo Munnich, kiu lin rangaltigis je kapitano, kio tuj kaŭzis grandan envion de aliaj oficiroj.

Sur la batalejo lia kruelega batalmaniero elvokadis eĉ teruron. Bedaŭrinde lia impulsa konduto ofte kaŭzis konflikton kun militistaj reguloj. Foje okazis, ke dum la vicigo de la regimento, la supera oficiro de Trenck, kolonelo

Meyer vidalvide de la tuta formacio riproĉis al Trenck iajn mankojn, nu certe, tiun humiligon la kolerema Trenck ne kapablis elteni kaj per unu svingo de la dekstra pugno li sendis kolonelon en terpolvon. Militista tribunalo verdiktis morton, sed Trenck ne kapitulacis, li petis marŝalon Munnich pri la amnestio, kondiĉe ke li en la plej proksima batalo dehakos kapojn de tri Turkoj. Kaj vere okazis, ke Trenck revenis havante ĉe la selo alligitaj ne tri sed kvar kapojn dehakitajn al turkaj malamikoj, ĉiuj konsterniĝis vidante kiel Trenck ridegante ĵetadis sangantajn kapojn teren.

Fortuno favoris Trenckon, ĉar pro sia sentima batalado ĉe la riveroj Bug, Dnestr kaj Prut en Moldavio li estis rangpromociita je majoro. Sed fortuna estas kaprica, ĉar Trenck pro novaj deliktoj kontraŭ superuloj estis denove kondamnita al morto - la verdikto poste estis ŝanĝita je ekzilo en Sibirion kaj fine nur al 6-monata enkarcerigo en la kieva citadelo. Tamen ankaŭ tie Trenck ne restis longe, ĉar ĉe la fino de la jaro 1739 li estis definitive el Rusio ellandigita. Trenck poste revenis al siaj bienoj en Slavonio (en Pleternica), kie la maltrankvila limo ĉiutage okazigadis batalojn kontraŭ turkaj taĉmentoj kaj lokaj banditaroj. Barono Trenck, filo de prusa kolonelo en aŭstria servoj, ĉi tie gajnis pluajn batalspertojn.

La jaro 1740 alportis por Trenck novan eblecon demonstri siajn militistajn spertojn en la servo de juna regantino Maria Theresia, kiu apenaŭ eksidis sur la tronon, tuj ĉiuj ĉirkaŭ ŝi kontestadis ŝiajn rajtojn je habsburgaj heredaj landoj. Bavaria princo-elektisto Karl Albrecht kavis intencon fariĝi imperiestro kaj pretendis Bohemion. Saksa reganto kaj pola reĝo August la III-a intencis akiri Moravion kaj la prusa reĝo Friedrich la II-a aspiris gajni Silezion. Francaj Bourbonoj vidis favoran okazon superi sian habsburgan rivalon kaj gajni aŭstrian Nederlandon (Belgion) kaj samtempe postulis aŭstriaajn koloniojn en Italujo por siaj hispanaj kaj napolaj parencoj.

En la jaro 1740 prusa armeo invadis Silezion, rapide kaptis Wroclaw (Breslaŭ) kaj aliajn lokojn. Imperiestrino Maria Theresia en tiu situacio ne povis longe heziti akcepti proponon de iomete sovaĝe aspektanta barono Trenck, ke li je siaj propraj kostoj ekipus unu milon da Kroatoj - korpuso de Panduroj (latine BENDERIIUM) por batali en armeo de ŝia Majesto. Tiu korpuso de Trenck konsistis el diversaj kanajloj kaj aventuristoj, ĉefe ili devis esti fortikaj.

La 27-an de majo 1740 majoro barono Trenck parademarŝis kun siaj Panduroj, akompanataj de sonoj de la unua militista muziko en mondo, vidalvide de Maria Theresia. En la sekvanta jaro 1741 finiĝis la ekzercado de Panduroj. Slavonaj husaroj armitaj de kalkano ĝis la kapoj krom la sabro havis du ĝis kvar pistolojn. Vestitaj ili estis per larĝaj turkaj pantalonoj kaj liberaj jaketoj, piedvestitaj per malpezaj ŝuetoj kun ruĝa felo, sur la kapo borderita ĉapo (KOLPAKO). Pro siaj flirtantaj ruĝaj mateloj kun kapuĉoj ili estis nomataj ruĝaj kapucenoj, kiuj nun komencis vagadi sur eŭropaj militejoj.

Batal-operacioj kontraŭ la prusa armeo Panduroj komencis en Silezio, kie la habsburha armeo suferis gravan malvenkon en aprilo 1741. Alvenintaj Panduroj faris je supera komandanto duko Neipperg la plej malbonan impreson, nu ne miru, sovaĝa bando, kurioze vestita kaj sen iu ajna militista disciplino. Li akre malaprobis sovaĝan rabadon, kiu ĉiam sekvis post iliaj kuraĝaj batal-agoj. Konfliktoj inter Trenck kaj aliaj komandantoj abundis ĉiutage.

Sed milito progresis kaj malamikoj de Maria Theresia multobliĝis - francaj trupoj de generalo Belleis, komence de aŭgusto 1741, transpaŝis Rejnnon kaj en novembro okupis Pragon, kie ili lasis kronigi la bavan princon-elektiston Karl Albrecht kiel Bohemian reĝon. Bavara armeo invadis supran Aŭstrion kaj okupis urbon Linz. En tiu grava situacio Trenck kun siaj Panduroj estis translokigita al la supra Aŭstrio por batali kontraŭ bavara-franca armeo. Meze de januaro rotoj de Panduroj aperis antaŭ Linz

kaj nokte de la 23-a al la 24-a de januaro 1742, en forta neĝoblovado, ili fariĝis regantoj de granda parto de la urbo Linz.

Dum la jaro 1742 la milito pri aŭstria heredaĵo iom post iom estingiĝis. Prusio plifortigadis sian regadon en Silezio. Armeoj de francoj kaj de la princo-elektisto Karl Albrecht (de la 24-a de januaro 1742 romia imperatoro) retiriĝadis en internon de Bavario.

La 13-an de februaro 1742 Karl von Lothringen okupis Munkenon (München). Panduroj de Trenck ricevis taskon ekzekuci militajn kontribuojn en Bavario. Por Panduroj, kiuj estis majstroj de rabado, tio estis tre konvena tasko. Ĉie disvastiĝis sento de teruro, kiu akompanis ilian furiozegadon. Eĉ hodiaŭ enloĝantoj de la bavara urbo Cham rememorigas septembrajn tagojn de la jaro 1742, kiam slavoniaj husaroj kaj kroataj rajdistoj konkeris ilian fortikigita urbeton, kaj sekvantan sovaĝan rabadon kaj murdadon. Trenck antaŭ sia morto penis trankviligi sian konsciencon, li testamentis 4000 ormonerojn al Cham por konstrui malsanulejon.

Je dislimo de la jaroj 1742/43 francaj trupoj retiriĝis el Bohemio kaj bataloj translokiĝis al Alsaslando, kie kontinuus duelo de Bourbonoj kun Habsburgoj pri la hegemonio sur la kontinento. Trenck kun siaj Panduroj transiris Rejnnon ĉe Breisach nokte de la 13-a al 14-a de aŭgusto 1743 kaj komencis tie disvastigi famon pri sia kuraĝo kaj senlima avareco. Tamen en bataloj ili akiris kelkajn sukcesojn, sekve Trenck estis rangaltigita je kolonelo.

Unu jaron poste (en julio 1744) prusa reĝo Friedrich la II-a kontraktis kun imperiestro Karl la VII-a Albrecht novan akordon pri divido de Bohemiaj landoj, sekve Prusoj invadis Bohemion ĉe la urbo Broumov (Braunau) kaj avancis rapide en internon de Bohemio tra Prago, Tábor kaj la 24-an de septembro ili jam okupis České Budějovice (Budweis). Trupoj de Karl von Lothringen rapide returnis en Bohemion. Panduroj de kolonelo Trenck, en kies vicoj estis ankaŭ la fama oficiro Laudon, konkeris České Budějovice (Budweis) la 22-an de oktobro 1744, kaj la sekvantan tagon ili estis mastroj de la urbeto Hluboká nad Vltavou (Frauenburg). Prusoj komencis retiriĝi kaj meze de decembro 1744 ili foriris el Bohemio definitive.

Milito nun transpasis al Silezio, en junio 1745 prusaj trupoj denove penetris en orientan Bohemion, kie la supera aŭstria komandanto Karl von Lothringen (frato de imperiestro Franz von Lotringen kaj bofrato de la granda Maria Theresia) suferis vicon de malvenkoj en batalo kontraŭ Prusoj. La plej fatala malvenko okazis en batalo ĉe Horní Žďár (Soor) proksime de la urbo Trutnov (Trautenberg). Trenck kun sia korpuso, kiu nun nombris 5000 armitoj, alvenis por helpi en la batalo kontraŭ Prusoj. La menciita decida batalo kaj ankaŭ la lasta de barono Trenck okazis la 30-an de novembro 1745. Dum tiu decida batalo Panduroj trovis forlasitan ĝeneralan kvartirejon de la prusa reĝo kaj en ĝi troviĝis ĉio, pri kio ili plej sopiris, nome 80 000

dukatoj, arĝenta servico de la reĝo, eĉ lia amata hundo Biche, entute ilia rabaĵo faris 2 milionojn da ormoneroj. Ili ankaŭ detruis ĉiuj importajn dokumentojn de la prusa ĉefa stabo.

Post tiu malsukcesa batalo Trenck estis akuzita, ke li estis subaĉetita de la prusa reĝo, ĉar dum Panduroj rabis, aliaj aŭstriaj trupoj sangis. Trenck sukcesis tiun akuzon rifuzi, sed laŭ la verdikto li estis devinta pagi monpunon de 120 000 ormoneroj.

Tiun sumon Trenck rifuzis pagi, tio estis ne malgranda aŭdaco, ĉar temis pri malhonorigo de la ordono de imperiestrino mem. Do, en la jaro 1746 komenciĝis nova proceso kontraŭ Trenck kun verdikto - **malliberigo en Vieno** - Trenck helpe de sia ruzo fuĝis el la karcero. Dum la sekvanta proceso, je interveno de la imperiestrino Maria Theresia, la antaŭe donita puno estis nuligita kaj Trenck saviĝis nur kun - **hejma enkarcerigo**. Barono Trenck la ordonon entute ne respektis kaj iuvespere en sia plej nobla kaleŝo provokeme veturis tra la tuta Vieno al kortega teatro. Malbonŝance, en teatro ĉeestis ankaŭ anoj de imperia kortego kaj kiam Trenck ekvidis prezidanton de la milita tribunalo sidantan en la apuda loĝio, li tuj lin atakis kaj intencis lin sendi en parteron kapoantaŭen. Sekvis juĝa proceso kun verdikto - puno de morto - denove intervenis Maria Theresia, ŝi favore taksis meritojn de la kuraĝa militisto kaj la punon ŝanĝis al - Karcero Ŝpilberk ĝis la morto. Trenck ne uzis eblecon peti de ŝia Majesto amnestion, lia fiero tion ne permesis. Do, vespere la 30-an de aŭgusto 1748 militista eskorto liveris al karcero Ŝpilberk en Brno viron, kiu per sia vizaĝo kaj vesto aspektis iomete ekzote, tiu estis eksa kolonelo de la imperiestra kaj reĝa armeo kaj la fama komandanto de la pandura korpuso, barono Trenck.

Tiel fariĝis Barono Franz von Trenck la plej glora arestito de la plej fama malliberejo en la tuta habsburga monarkio, Ŝpilberk en Brunno.

En la fortikaĵo li pasigis tempon en rememoroj pri sukcesaj bataloj, sed laŭ legendo ankaŭ planis fuĝi en fermita ĉerko.

Kun la tempo Trenck estis grave malsana, turmentis lin malnovaj batal-vundoj kaj lia korpo suferis pro hidropso (akumuliĝo de likvaĵo en korpaj kavoj). Ĉe la fino de septembro 1749 li skribis sian testamenton, en kiu li postlasis 60 000 orajn monerojn al fratoj kapucenoj, kiuj lin flegis dum la malsano.

La 4-an de oktobro 1749 Barono Trenck en karcero Ŝpilberk mortis, en aĝo de 38 jaroj. Laŭ sia testamento li estis entombigita en la kapucena kripto, kie lia kadavro, sekigita ĝis osto, kun uniformo ne pezas pli ol ses kilogramojn. Li dormas en stana ĉerko kun vitra kovrilo, la origina ligna kovrilo apogita ĉe muro portas lian blazonon kun latina surskribo "PER PROCELLAS AD PORTUM" - tra ŝtormoj al la porto. Tiun novan ĉerkon provizis lia pranepo, majoro de la imperiestra kaj reĝa armeo Heinrich von Trenk en la jaro 1872.

Al morto de kolonelo Trenck estas ligitaj multaj legendoj, laŭ unu la kapo de Trenck, post lia morto, estis detranĉita, por certigi, ke la ruza Trenck sian morton nur ne ŝajnigas kaj ĝi estis liverita al ŝia Majesto Maria Theresia, kiu la kapon ne akceptis kaj dum transporto reen ĝi perdiĝis. Antropologia ekspertizo konfirmis, ke la kadavraĵo, sekigita je osto, apartenas vere al kolonelo Franz von Trenck, nur pri la kapo ne estis decidite, ĉu ĝi apartenas al iu kapucena monaĥo aŭ ĝi estas virina?

La vivon de Barono von Trenck priskribas itala eldono de liaj rememoroj "FRANCESCO BARONE DE TRENCK COMANDANTE DELLI PANDVRI" .

Kaj kio okazis kun Panduroj? Ili estis envicigitaj en la 53-an zagreban infanteri-regimenton.

bildo el Vikipedio